Socikultura bulteno
de Fokolar-movado

Decembro 2018

# ‘Nova Urbo‘

UNUECO TRANS ĈIUJ KULTUROJ

> ni Pontu <

## Kristnaska militpaŭzo






Antaŭ 100 jaroj finiĝis la unua mondmilito, en kiu kontraŭbatalis la du ŝtat-aliancoj:

- **Centraj Imperioj** / Centraj Potencoj – Germana Imperio (la t.n. "Dua Regno" ge: *Zweites Reich**) kaj Aŭstro-Hungario, helpitaj de Otomana Imperio /Turkio kaj de Bulgario;
- **Triopa Entento** – Francio, Britujo kaj Rusio (al kiuj poste aliĝis Belgio, Rumanio, Grekio kaj Serbio).

La milito daŭris pl ol 4 jarojn kaj 3 monatojn, dum kiuj preskaŭ 9 milionoj mortis, 21 milionoj estis vunditaj kaj ĉ. 8 milionoj pereis (perdiĝis). Okaze de tiu memorinda datreveno, vi povas legi artikolon pri senprecedenca evento okazinta komence de la milito kaj nomita "Kristaska Militpaŭzo" (ang: *Christmas truce*, fr: *Trêve de Noël*, ru: *Roĵdestvenskoje pjeremirie* /Рождéственское перемúрие ge: *Weihnachtsfrieden*.

En jaro 2005, Francio produktis 116-minutan filmon pri la Kristnaska Militpaŭzo kaj oni prezentis ĝin samjare dum la renoma Filmfestivalo en Cannes. Supre ni montras afiŝon pri tiu filmo. Reĝisoris ĝin Ch.Carion sub la titolo **Joyeux Noël** (eo: *Ĝojan Kristnaskon* /an: *Merry Christmas* /ru: *Счастлúвого Рождествá - Ŝcastlivogo Roĵdestva* /ge: *Fröhliche Weihnachten*). La scenoj estis filmitaj en Francio, Britujo, Belgio, Germanio kaj Rumanio. Ĉi tie vi povas vidi la heroldan filmeton :

- franclingve kun nederlandaj subskriboj
  (1:54) https://www.youtube.com/watch?v=AvVRxgqG3iM
- angle - (2:34) https://www.youtube.com/watch?v=KRrr-CDXijs
- kaj germane - "Weltkrieg 1914 Weihnachten"
  (4:08) https://www.youtube.com/watch?v=e64ojMGd7jE



Historia foto pri tiu evento, farita decembre 1914

En la Kristnaska Vespero okazis la unua provo de "fratiĝo" inter germanaj soldatoj kaj fusilistoj el Kimrujo (okcidenta lando en brita insulo), kiujn komandis kapitano Stockwell. La oficiroj de ambaŭ malamikaj flankoj unue konsentis ne uzi pafilojn ĝis la mateno de la dua festotago (la 26an de decembro 1914 je la horo 8:30). Dum tiuj tagoj, la soldatoj restu en la tranĉeoj sed ne pafu. Sekve, la germanoj alportis abian arbon, lumigis ĝin per lampetoj kaj komencis kanti siajn kristnaskajn kantojn. Ĉe la alia flanko de la fronto eksonis ankaŭ la britaj. En tiel nekutima atmosfero, la oficiroj de ambaŭ malamikaj batalionoj permesis, ke la soldatoj renkontiĝu sur neŭtrala grundo inter la tranĉeoj, tiutempe nomata "nenies teritorio" (*no man's land*).



Jen la kanto kun teksto trilingva - (1:52) https://www.youtube.com/watch?v=4j4ye_Djhs0 .
Tie aŭdiĝas fone la populara germana Kristnaska kanto *O Tannenbaum* ("Abio vi"). Jen ĝi en kelkaj aliaj lingvoj:

Germane: https://www.youtube.com/watch?v=HbU3yzruQ14
France: https://www.youtube.com/watch?v=j8jHSLwRS74
Itale: https://www.youtube.com/watch?v=CEn4cPeVLEA
Angle: https://www.youtube.com/watch?v=gwgot1jKcXU
Hispane: https://www.youtube.com/watch?v=oirrPQKn9t4

La melodio aŭdeblas en multaj landoj, eble ankaŭ en la via? Se vi trovas ĝin, eĉ kun la ŝanĝita teksto – bonvolu sendi ĉi tien kaj ni volonte kompletigos la supran liston. Fine, la teksto kun ĝia E-tradukaĵo:

O Tannenbaum, o Tannenbaum,
wie treu sind deine Blätter!
Du grünst nicht nur zur Sommerzeit,
Nein auch im Winter, wenn es schneit.
O Tannenbaum, o Tannenbaum,
wie treu sind deine Blätter!

Abio vi, abio vi, kun foliar' fidela!
Abio vi, abio vi kun foliar' fidela!
Vi verdas ne nur en somer'
Sed eĉ dum vintra neĝveter'
Abio vi, abio vi kun foliar' fidela!

O Tannenbaum, o Tannenbaum!
Du kannst mir sehr gefallen!
Wie oft hat nicht zur Weihnachtszeit
Ein Baum von dir mich hoch erfreut!
O Tannenbaum, o Tannenbaum!
Du kannst mir sehr gefallen!

Abio vi, abio vi al mi tre multe plaĉas.
Abio vi, abio vi al mi tre multe plaĉas.
Ho, kiom ofte ĝojis mi
En la kristnaska bril' de vi!
Abio vi, abio vi al mi tre multe plaĉas.

O Tannenbaum, o Tannenbaum!
Du kannst mir sehr gefallen!
Wie oft hat nicht zur Weihnachtszeit
Ein Baum von dir mich hoch erfreut!
O Tannenbaum, o Tannenbaum!
Du kannst mir sehr gefallen!

Abio vi, abio vi instruon donas bonan.
Abio vi, abio vi instruon donas bonan.
Espero kaj la konstantec'
Konservas forton de junec'.
Abio vi, abio vi instruon donas bonan.

(Daŭrigo en **https://familiaro.com** )

---

# La Torĉo




Transiru obstaklojn !

*La simpatiuloj de ĉi tiu rubriko povis legi multe pri la plej grandaj eventoj kiel ekz. Olimpikoj, Futbala Mondĉampionado aŭ Mondaj Ludoj. Nun ni publikigas iom da pensoj pri utileco de sportado, same por individua bonfarto kiel por la socia. Tion montras rakonto pri organizado de sportaj aktivecoj inter la strat-infanoj en Brazilo ( fine de "La Torĉo" ).*

## Kongreso de Sportmeet - 2018

Multaj konscias pli kaj pli, ke sporto ludas hodiaŭ gravan rolon en rompado de bariloj inter homoj de diversaj kulturoj, nacioj kaj sociaj sistemoj. Laŭ sia originala naturo, sporto estas tia kampo de aktiveco, en kiu oni alfrontas limitecojn kaj volas ilin transpaŝi. Tion scias ne nur la ĉampionoj, sed ankaŭ simplaj homoj kiuj devigas sin marŝi /kuri, naĝi aŭ gimnastiki por plifortigi sian korpon kaj sanon.

Kial sporto fariĝas ankaŭ bona tereno por renkontoj, por socia integriĝo, venko super antaŭjuĝoj, reciproka konatiĝo kaj por internacia amikeco? Kie troveblas ĝia magio?

(Daŭrigo en **https://familiaro.com** )

---

# Kune por Eŭropo

Fariĝis jam la tradicio, ke meze de ĉiujara novembro okazas renkontiĝo “Kune por Eŭropo”.  Ĝis nun ĝin organizis diversaj urboj:  Ottomaring, Stuttgart – dufoje, Romo, Bruselo, Munkeno kaj Vieno.  En lasta novembro, tiu renkontiĝo estis organizita en Prago.




(Daŭrigo en  [https://familiaro.com](https://familiaro.com) )

---

# Sirio:  Leviĝi el cindroj

(Parto 1)

Septembro finiĝis.  En la tuta, kiu decidis libertempi en Alepo, nur mi eksterlandano. Tie ni estis invititaj kaj dum ni veturis per taksio, antaŭ niaj okuloj aperis komplete detruita urbo. Ĉie videblis ruinoj: kiom da mortaj homoj restas sub tiuj ruinoj?  La prezo, kiun pagis la nacio dum tiu milito, estis alta, neimageble alta. Miloj kaj miloj mortis, aliaj malsaniĝis, travivis egan traŭmon, estas vunditaj psike kaj sentas izoliĝon. Eduksistemo ne funkcias, nek trejnado profesia aŭ metia. Multaj infanoj orfaniĝis aŭ estas forlasitaj. Listo de tiuj malfeliĉoj estas tre longa...

Kun Maher kaj kun aliaj homoj, mi kutimis regule troti en bela parko – meze de la urbo.  '*Nun regas tie ĉi atmosfero malgaja, senespera.  Sed post kelkaj monatoj ĉio fariĝos pli normala, ja ĉi tiu lando fieras pro sia glora pasinteco*' – konsolas Nabla. Post multaj jaroj eksonis denove muzika koncerto en antikva parto de Alepo, sur ties supra kvartalo.  Okazis ankaŭ dancoj kaj deklamado de la tradicia poezio.  Kvar mil homoj kunkantis kaj kreis neforgeseblan etoson, kvazaŭ en festo kaj spite al milito.



Surloke mi ofte demandis la loĝanatojn: "Laŭ via opinio, kio estas grava por alfronti la estontecon?" Mi pensis, ke unue oni devas denove konstrui domojn kaj komenci industrian produktadon. Sed, je mia granda surprizo, plej ofte mi aŭdis, ke "tio estu granda spirita forto, kiu ebligas komenci novan vivon kaj naskiĝi denove ĉi tie – sur la tero de niaj antaŭuloj".

(Daŭrigo en **https://familiaro.com** )

---

# Nia Vilaĝo

Homo kaj naturo





*Kiam hungara farmisto Sándor Tari konatiĝis kun la fokolara idealo pri unueco, li komprenis ke ĝi povas kuracigi la mondon. Do li decidis dividi la ideon kun aliaj vilaĝanoj.*

## Donaci animon al urbo

Uzante simplan lingvon pri amikeco inter najbaroj, Sandor povis klarigi kiel oni povas konstrui pli bonan socion. Komence malgranda grupo de la farmistoj renkontiĝis ĉiumonate kaj parolis pri siaj problemoj, laboro, ĝojo aŭ doloroj. Ili sentis ke tio estas la grava tasko esti kune kaj kunlabori. Ilia regula kontakto kun la naturo kaj saĝeco lernita de ĝi, instigis kontakti ankaŭ homojn kiuj vivas en la urbo.



La renkontiĝoj kaj interŝanĝo de opinioj gvidis al praktika konkludo. Ne sufiĉas nur plendi pri la minaco de globalismo (tutmondigo) kiu detruas naciajn kulturojn, tradiciojn kaj subfosas bazajn valorojn. Oni devas krei surloke realan alternativon.

(Daŭrigo en **https://familiaro.com** )

---



Utilaj plantoj:

## Kapsiko

Kapsiko (*Capsicum* L) estas diverskolora legomo el familio ***Solacanoj**** kiu devenas el Sudameriko. Unue, kapsiko populariĝis tra aliaj varmklimataj landoj kaj oni rimarkis ke la semoj tenis tre longe sian kapablon ĝermadi. Tio faciligis veturigi ilin per ŝipoj al Iberia Duoninsulo, de kie ĝi rapide disvastiĝis en la kuirejoj de aliaj eŭropaj landoj.  Sekve, ĉi tiu kreskaĵo estis veturigata plu, al aliaj kontinentoj.

Kapsiko konsistas el ĉ. 25 diversaj specioj, inter kiuj nur kelkaj estas uzataj por manĝado, inter ili la plej populara estas **kapsiko unujara** (*Capsicum annuum*). En tiu grupo, troviĝas milda kapsiko, aŭ sonorila nomita tiel en la angla, ĉar laŭforme ĝi similas al sonoriloj. Tiuspeca kapsiko havas delikatan, krispan pulpon tial farmistoj facile ĝin vendas.



Post la rikoltado, en Hungario oni organizas "Festivalojn de Kapsiko"

Specialistoj pri manĝado diras, ke kapsiko similas al riĉa minejo, plena de trezoroj. Oni scias, ke ĉi tiu legomo abundas je **vitamino C**, sed en ĝi troviĝas ankaŭ vitamino **E**, flavonido (vitamino **P**) kaj diversaj **mineraloj** (i.a. kalio, magnezio, kalcio kaj fero). Tiuj avantaĝoj helpas imunigi la organismon kaj preventi kontraŭ anemio, kaŭzita per manko de fero.
Diversaj fontoj citas multajn avantaĝojn de ĉi tiu kreskaĵo kaj ni mencias kelkajn. Kapsiko maldensigas iomete sangon kaj tiel ĝi helpas reguligi kardiovaskulan (sangocirkulan) sistemon. Tiu ĉi legomo enhavas kemian kombinaĵon similan al hormono kaj nomita **kortizolo** kiu povas malgrandigi kvanton de acido en muskoloj kaj protekti kontraŭ internaj inflamoj.

(Daŭrigo en **https://familiaro.com** )